

Sonorilo

63-a jaro, n-ro 2

marto-aŭgusto 1971

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO




Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO: Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

ADMINISTRADO: Balleux René, Oude Donkiaan 83, 2100 Deurne



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO
Sint Bernardse Steenweg 1078, Hoboken. Tel. (03) 276643

HONORA ĜENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice (†)

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO
D-ro Kempeneers Paul Sielens Henri

FEDERACIA PREZIDANTO
D-ro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin, Liège

VICPREZIDANTOJ
Jacobs R. — Poupey Ch.

ĜENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, St. Bernardse Steenweg 1078, 2710 Hoboken

FEDERACIA KASISTO
Balleux René, Oude Donkiaan 83, Deurne

POŝTKONTO DE B.E.F.: 1634 34 OUDE DONKLAAN 83, 2100 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
F-ino Orsolini A., rue P. Pastur 6, 6000 Charleroi. P.K. 2016 40

9-a MARKOLA KONGRESO

53-a kongreso de la Belga Esperanto-Federacio
CALAIS, 29, 30, 31 de majo 1971

1) *Calais, la ville qui, par intermittence, appartenait à l'Angleterre et la France.*
(nekonata aŭtoro de la ?-a jarcento)

Kiu skribis tion? Ĝi ne estas tute ĝusta. Ĝi ja apartenis al Anglujo depost la mezo de la 14-a ĝis la mezo de la 16-a jarcento. Antaŭe ĝi ankaŭ apartenis al la Graflando Flandrujo kaj al Bonen (= Boulogne). Tiu urbo estis fondita de frato de la flandra grafo Filipo de Elzaco, proksimume samtempe kiel Damme, Nieuwpoort, kaj Grevelingen (= Gravelines). Tiu frato estis tiutempe (dua duono de la 12-a jc.) grafo de Boulogne. Ĉiuokaze ĝi estas bone elektita urbo por kongresigi anglojn kaj flandrajn belgojn, ĉar ambaŭ povas trovi multajn memorigaĵojn pri tiuj epokoj. Inter ili plej fama estas la bronza verko de Rodin: la Burĝoj de Calais.

2) *La vie et la mort vont côté à côté;*
si l'une est amie, l'autre est notre hôte.

Proksimume sammomente kiam en Calais alvenis la unuaj kongresanoj kaj ke do fakte la kongreso komenciĝis, tiuj de Bruĝo enterigis bonan esperantistinon: Suzanne Van Den Berghe, edzino Verbeke. Do ne estis sen iu morna sento ke tiuj venis al nia jara festo. La enteriga ceremonio estis kortuŝa manifestacio, se ni povas uzi tiun vorton. Estis Esperanto-flago por saluti ŝin lastfoje. En sia homilio la rev. patro trafe subtekis la rolon de Esperanto en la vivo de tiu idealista virino. Cetere ankaŭ la memorbildeto mencias tion.

Sed ni devas plui . . . espereble kun ŝia memoro kiel flamo en nia koro. Interkonatiĝa vespero okazis en la "Maison des Jeunes". Ĝi estis transformita en dancvesperon pro la fakto ke la junaj kongresanoj devis jam reveturi la dimanĉan vesperon. Efektive kelkfoje ni vidis dancon. Plurfoje ni admiris (?) iun ĝangalaĵon, sed sen la ritaj ceremonioj en la reala ĝangalo, kiuj faras tiujn lastajn tamen iaj kulturaj manifestacioj, ankaŭ se de primitivaj popoloj. Malgraŭ ĉio, ŝajne ĉiuj bone amuziĝis. Kaj tio do bone preparis ilin por la peza, laborplena (?) posta tago.

SUR LA KOVRILO

Kant- kaj dancensemblo "Třebíččan" el Ĉeĥoslovakio, kiu antaŭ kelkaj monatoj, kun la helpo de la lokaj gesamideanoj, organizis sukcesplenan prezentadon en Antverpeno.

Ĝia direktoro František Sedláček skribas: "En ĉiu urbo, kie nia ensemble kantas kaj dancos, ni propagandos la internacian lingvon kaj prezentos kelkajn kantojn en Esperanto."

Dimanĉmatene estis kompreneble sankta meso, kiun partoprenis ankaŭ nekredantoj; ankoraŭ kompreneble ĉar ĝi estas ĉiam esperanta manifestacio. Sed, ho ve, ne ĉeestis esperantonparolanta pastro. Felice la vigla s-ano Doyelle tuj funkciis kiel helppastro (kial ne, en la postkoncilia periodo?) kaj preĝis kaj predikis en Esperanto. Nia afero estis savita!

3) *"Sonorilo" cette revue familière,
jadis mensuelle, maintenant . . . (un tout petit) annuelle.*

En niaj kongresoj la dimanĉan matenon okazas la *laborkunvenoj*. Dum la komuna kunveno de angloj, francoj, kaj belgoj oni pritraktis la revueton "La Markolano" kaj je tiu okazo la belgoj ĝenerale kaj la bruĝanoj speciale devis aŭdi kaj toleri, rilate "Sonorilon", diraĵojn kiuj alterne paligis kaj ruĝigis nin, kaj kiuj "kuŝas sur mia stomako" ankoraŭ nun en la momento kiam mi kunmetas tiun ĉi raporton! La cetera laboro konsistis el la aprobado de ĉio kio estis decidita en la apartaj kunvenoj. Kaj tiu aparta de la belgoj pritraktis la jenajn aferojn:

- 1) La karoloreĝa grupo gajnis por 1970 la premion Jennen. Radianta fraŭlino Orsolini akceptis la kapitalon! Por 1971 la bruĝa grupo "Paco kaj Justeco" gajnis tiun premion. La juna kaj ĉarma kasistino Hilda Lauwers almetis tiun novan kapitalon apud la aliaj de tiu vigla grupo!
- 2) Venontaj kongresoj. En 1972 ĝi okazos en Antverpeno (29 kaj 20 aprilo kaj 1-a de majo). La memfida, certeca rigardo de la juna prezidanto de tiu urbo, Jo Haazen, estis jam garantio de sukceso!
- 3) D-ro Denoël preparolis la manifestacion de la 8-a de majo en Bruselo antaŭ la televida konstruaĵo. Ĝi iĝis bela sukceso kun multaj diversaj reakcioj. Li disvolvis planon por instigi UEA-on ke la dua sabato de majo iĝu la tago de ĉiujara tia manifestacio en plej eble multaj landoj. Se nun ni atakis (pace!) la BRT-RTB, alian fojon ni povos eble aliri internacian instancon en Bruselo.

Tagmeze estis oficiala akcepto en la urbdomo kie ni digestis agrablajn alparolojn . . . kaj honorvinon. Ekstere jam atendis la fotografistoj por eternigi per bildoj kion la memoro ne kapblas eternigi. Ĉirkaŭ la unua horo la aŭtobusoj veturigis nin al Tournehem por la bankedo. Tiu iom abunda manĝado daŭris preskaŭ la tutan posttagmezon. Reveninte en Calais ni ankoraŭ havis la plezuron vidi alveni kaj reforiri "Hoovercraft". Vespere okazis la distra vespero en la tre bela antikva salonego de la urbdomo. Franca junulara grupo prizorgis ĝin: bela kolorfilmo pri la Ardenoj kaj precipe pri la vivo de la bestoj en la arbaroj; kantado fare de parizano s-ro Coudry; filmo de Fiat pri operacio "Sekureco" rilate al akcidentoj sen kaj kun sekureczone; deklamado de la fabelo "La korvo kaj la vulpo" fare de en bestoj vestitaj junuloj; klasika muziko; mallonga skizo "En la vagonaro"; denove s-ro Coudry per amuza rakonto; fine filmo: "Perspectives Françaises 'L'Aquitaine'."

4) *Butterfly, ma Butterfly, dans un mois je reviendrais . . .*

La lundo estas jam la forirtago . . . plena je nostalgio. Supran verson mi aŭdis kanti de partoprenanto kiu estis loĝinta . . . en la junulargastejo. Mi ne sukcesis havi priskribon de tiu domo; oni diris ke tio estus superhoma tasko! Do, kara leganto, mi tre bedaŭras!

Fina komuna kunsido de la "markolanoj" (ĉu aparta, stranga gento??) okazis en la bela salono de la geedziĝoj. S-ro Rapley prezentis sur bendo salutparolojn de s-ro Fighiera el Londono kaj tiujn de konataj anglaj samideanoj. S-ro Doyelle legis la salutleterojn kaj komunikis ke prof. Lapenna telefonis al Calais por deziri sukceson. S-ro Verstraete nome de B.E.F. dankis la L.K.K.-on, kiu en malfavoraj cirkonstancoj tamen volis organizi tiun kongreson. Post dankvortoj de s-ro Doyelle, la LKK-prezidanto, s-ro Buerick, fermis la kongreson. La partoprenantoj adiaŭis . . . kaj ĵuris revidon en Antverpeno.

Noto: la redaktoro dankas la bonvolajn kontribuintojn je tiu ĉi raporto, kun la espero (kvazaŭ certeco) ke ĝi bone respegulas la kongreson.

KORESPONDANONCOJ

62-jara svedo deziras korespondi kun belginoj pri ĉiuj temoj, interŝanĝas bildkartojn kaj fotojn. S-ro Arne Bengtsson, Åbybergsgatan 32, S 43131 Mölndal, Svedujo.

10-jara knabo Pavel Prihradsky Nadlak, H.P. 12, Jud. Arad, Rumanujo, interesiĝas pri fotografado.

S-ro Matysiak Jeny, Biale-Bloto 2, pon. Olesnica, pla. Gwabownow, woj. Wrocław, Polujo; 29-jara fraŭlo, interesiĝas pri poŝmarkoj, bildkartoj, kaj metalaj moneroj.



ESPERANTO-TAGO

en BELGUJO

Alparolado de s-ano Boffejon H., la 8an de majo 1971.

Sinjoroj estraranoj,

Mi dankas vin, ke vi havigis al mi la okazon paroli en tiu ĉi kunveno.

*Sinjorinoj,
Sinjoroj,
Geamikoj,*

Antaŭ ĉio mi volas gratuli la iniciatintojn kaj la organizintojn de la hodiaŭa manifestacio, kaj mi same gratulas vin, kiuj ĉeestas ĝin.

Kelkaj inter vi eble pensas ke tia manifestacio estas senefika kaj senutila. Ili eraras. Tiu ĉi manifestacio estis ja modesta. Sed en la nunaj cirkonstancoj kaj kun la nuna forto de la Esperanto-movado, pli impona elmontro de nia volo estus nebla.

Mi estas tamen konvinkita ke tia surstrata manifestacio, eĉ se modesta, estas multe pli efika ol ĉiuj klubkunvenoj kaj tuta jarkolekto de ĉiuj Esperantaj gazetoj, kiuj — komprenu min bone — estas utilaj kaj nepre necesaj interne de la movado, sed pri kiuj la ne-esperantista mondo ekscias nenion.

Tiom pri la efiko eksteren. Krom tio ni kompreneble esperas ke ĝi havos bonan rezulton, sed ni tamen ne faru al ni iluziojn tiurilate. Eĉ se rezultos el ĝi la dezirata televida kurso, ni kompreneble prave ĝojos, sed eĉ en tiu kazo ni ne estu tro fieraj.

Ni konis jam multajn tiajn rezultojn:

Okazis jam multaj radiodisaŭdigoj, kelkaj eĉ tre imponaj. La malpli junaj inter ni bone memoras la iaman "verdan stacion" de Brno. Kaj eĉ en nia propra lando ni mem estis siatempe tre fieraj pri la Esperanto-kursoj en "Radio Belgique".

Ni scias ja ke certa nombro da lernejoj jam dum pli-malpli longaj periodoj instruis Esperanton, kvankam ĝenerale nur fakultative.

Ni memoras la proponon de 16 ŝtatoj al la Ligo de Nacioj favore al Esperanto.

Ni konas la faman rezolucion de UNESKO en 1954.

Mi povus longe tiel daŭrigi; mi povus citi ankoraŭ grandan nombron da iamaj atingoj.

Sed mi demandas: Kio restas el ili?

Kaj mi respondas: Nenio!

Vi konas min sufiĉe bone por scii ke mi ne estas defetisto. Sed mi ne povas ne konstati ke nia movado, precipe en Belgio, estas hodiaŭ konsiderinde malpli forta ol antaŭ 30-40 jaroj.

Ne malofte, eĉ tre ofte, okazas ke personoj al kiuj ni parolas pri Esperanto, demandas: "Esperanto, ĉu tio ankoraŭ ekzistas?"

Ni ĉiuj spertas tion. Ni ĉiuj konstatas la stagnadon — en nia lando eĉ la malprogreson — de nia movado. Sed ni obstine rifuzas vidi la kialon kaj kuraci al ĝi. Estas tute nature ke dum multaj jaroj la Esperanto-movado ne povis esti io alia ol lingvokultura organizaĵo. Kaj ni devas esti feliĉaj pro tio, ĉar sur tiu kampo almenaŭ ni atingis la celon. Esperanto estas nun matura, plenalora lingvo uzebla kaj uzata sur ĉiuj terenoj de la homa aktiveco.

Sed en tiu, en si ĝojiga, rezulto kuŝas iusence la kaŭzo de la stagnado de nia movado.

La esperantistoj ja naive kredis ke la matureco kaj taŭgeco de la lingvo sufiĉus por ke ĝi estu akceptita far la kompetentaj instancoj. Sed kiam ni proponis la maturan lingvon, tuj evidentiĝis — kion ni cetere estus devintaj scii antaŭe — ke ĉiuj komplimentoj, gratuloj, kuraĝigoj kaj instigoj daŭrigi nian strebadon por nia nobla idealo, esprimitaj far la oficialuloj, estis puraj hipokritaĵoj, kaj ke la lingvo-imperiismo ne estas morta.

Sufiĉa pruvo de tio estas la skandala rifuzo far la Ĝenerala Sekretariato de UN eĉ nur konsideri la peticion de UEA kun 73 miloj da individuaj kaj kolektivaj subskriboj, kaj la ne malpli kondamninda entombigo far UNESKO de la propono de la skandinavaj landoj en 1966 "konsideri objektivite la bezonon kaj eblecon de internacia lingvo".

Sed la Esperanto-movado rezignacie kaj pasive enkasigis tiujn ofendojn kaj stoike daŭrigas sian lingvokulturan laboron, esperante pli bonan rezulton ĉe sekvonta okazo.

Nu, ni lasu al la ekzistanta Esperanto-movado tiun, cetere necesan, akademian rolon, sed ni komprenu jam ke kion ajn ni per ĝi atingos, tiel longe ke ni ne atingos la oficialigon de Esperanto far la registaroj, ĉiuj aliaj realigoj nepre estos efemeraj.

Ni ankaŭ konsciuj jam ke la grandaj potencoj, kaj sub ilia ekonomia kaj politika premo, la registaroj ĝenerale, ne libervole agnoskos Esperanton, kaj ke por tiu agnosko ni devas esti pretaj batali.

Ni komprenu jam ke, apud la pasiva akademian movado, ni urĝe bezonas aktivan organizaĵon, kiu koncentros ĉiujn siajn fortojn sur la batalon por la oficialigo kaj la deviga instruado de Esperanto.

Jam de multaj jaroj, ja jam de pli ol 30 jaroj, mi klopodadis instigi niajn gvidantojn eliri el sia malvasta samideana rondo. Tio kuŝas cetere al la bazo de la konflikto pro kiu mi siatempe ĉesigis mian aktivan kunlaboron en la belga movado, sen ke pro tio mi ĉesigis mian poresperantan laboron.

Eble vi memoras la gazeton "Mondo", kiun mi ekeldonis en 1956 en 200 000 ekzempleroj, 100 000 flandra- kaj 100 000 franclingvaj, kaj kiu bedaŭrinde, pro la neatenditaj mondpolitikaj eventoj de Suez kaj Hungario, kaj ankaŭ pro abomeninda fiago de tiel nomita samideano, fiaskis.

Intertempe tamen la cirkonstancoj ŝanĝiĝis kaj postulas nun aliajn metodojn. Ni devas jam definitive flankenmeti la iluzion ke la mondo, t.e. la politikistoj, libervole akceptos Esperanton.

Ni devas jam akcepti kiel certecon la fakton ke la grandaj potencoj, plue farante sian jam tradician imperiistan politikon, provados altrudi siajn proprajn lingvojn kiel komunan mondlingvon kaj nepre plue bojkotos Esperanton.

Ni devas kalkuli kun tio, ke la politikistoj kaj registaroj en la satelitaj landoj — ankaŭ en nia lando —, sub la ekonomia kaj politika premo de la grandaj potencoj, kunludos la ludon de la lingvo-imperiistoj, se ne forta enlanda premo devigos ilin fari pli dignan politikon por la paco kaj interproksimiĝo de la popoloj, en kiu Esperanto logike havus decan lokon.

Se vi bezonas plian ilustraĵon de tiu lingvo-imperiista politiko, vi nur turnu vian atenton al la humiliga, hontinda penetrado de la angla, t.e. de la usona lingvo en nian ĉiutagan vivon.

Tio estas eĉ pli hontinda por la flandroj, kiuj, post 140-jara justa lukto kontraŭ la francigo, nun sen rezisto, ja ŝajne eĉ kun fiereco kaj entuziasmo, akceptas tiun usonigon.

Cetere por neniu estas sekreto ke ĉiuj ŝtatoj, kaj inter ili kompreneble en la unua vico la grandaj potencoj, elspezas gigantajn sumojn por plivastigi la instruadon de sia lingvo tra la mondo.

El ĉio ĉi neeviteble sekvas, ke malgraŭ la nekontestebla evidenteco de la fakto ke estas nur unu ebla solvo al la mondlingva problemo, nome la akcepto de la sola neŭtrala, provita, kaj plenalora mondlingvo Esperanto, ni devos necedeme, nerezisteble, kaj venkovole lukti por atingi tion.

El tiu ĉi vidpunkto la alvoko por la hodiaŭa manifestacio en la marto-aprila numero de "Esperanto-Novajoj", la dumonata organo de "La Verda Stelo", aŭ pli ĝuste: la teksto de tiu alvoko, estas malaprobenda grava eraro.

Tiu alvoko tekstas jene:

"Luj esperantistoj hezitas por partopreni en tiu ĉi nia manifestacio, ĉar ili pensas ke temas pri kontestado aŭ demonstracio de malkontento kun sloganrubandoj kaj perfortaĵoj kiel dum la kamparana manifestacio de antaŭ kelkaj semajnoj.

Nenio de tio estas vera!!! Ni volas trankvile kaj pace montri ke nia peto pri televida Esperanto-kurso estas apogata far amaso de esperantistoj."

Estas ja tute klare, ke esperantista manifestacio, eĉ kun kategorie deklarita aktivisma karaktero, neniam okazos kun perfortaĵoj, ĉar tio estus absolute kontraŭa al la paca esenco de Esperanto.

Estas ankaŭ vere, ke tiu ĉi nia manifestacio ne povis havi kontestadan karakteron, ĉar nia pasiva movado antaŭe bedaŭrinde neniam aŭdigis postulon, kiun la koncerna instanco estus povinta rifuzi.

Sed pro tio ankoraŭ ne necesis speciale emfazi ke ni nepre ne postulas, sed — laŭkutime — nur ĝentile almozpetas.

Estas ja la rampa kaj kvazaŭ ekskuza tono de la komuniko en "Esperanto-Novajoj" kiu estas malaprobenda, ĉar ĝi estas maldigna humiligo de nia movado.

Erara estas ankaŭ, miaopinie, la tro humila tono de la rezolucioj de la internacia

konferenco de instruistoj, kiu okazis en Antverpeno en la komenco de aprilo. Tiu konferenco mem estis certe tre laŭdinda evento kaj la organizintoj meritas, pro la organizo, ĉiujn gratulojn. Bedaŭrinde estas nur, ke la rezolucioj de tiu konferenco, anstataŭ kuraĝe proklami la plenalorecon kaj taŭgecon de nia lingvo, kaj anstataŭ energie postuli la devigan instruadon de Esperanto, denove, konforme al la kutima pasivisma sinteno de nia movado, formulas proponon . . . minimalisman, pri instruo . . . eksperimenta, en nombro da lernejoj . . . limigita. Apud la pasiva kulturmovado ni bezonas aktivan batalorganon.

Apud la pasivismo de la akademia movado ni bezonas nelacigeblan aktivismon. Jam de pli ol du jaroj mi vane pledas antaŭ la belga esperantistaro por la starigo de tia aktivista organizaĵo.

Mi pensas cetere ke mi povas prave konjekti, ke tiu mia kampanjo por aktivista movado ne estas tute fremda al la iniciato pri la hodiaŭa manifestacio kiu, kiom ajn aplaŭdinda kaj utila ĝi estas, tamen ne sufiĉas. Se ĝi jam rompas la kutimon labori ekskluzive interne de la movado, ĝi tamen restas tradicia en tiu senco ke ĝi restas limigita inter jamaj esperantistoj kaj ke en la plej favora kazo ĝi iĝos nova tradicio de ĉiujara manifestacioto.

Kion ni bezonas, tio estas amasa premgrupo kiu konstante, persiste, dinamike, kaj agrese, kaj ja konteste!, faru premon, kiel sur la kulturajn, sociajn, kaj politikajn organizaĵojn, tiel ankaŭ sur la registarojn, la lokajn, naciajn, kaj internaciajn kompetentajn instancojn, por trudi — eventuale komence eĉ en unu lando — la oficialigon kaj la devigan instruadon de Esperanto.

Ĉar mi estas konvinkita ke tiu vojo estas la sola kiu povas konduki al la venko de nia afero, mi ekmalestimus min mem, se mi ne klopodus iri tiun vojon.

Tial mi lasas nenian dubon pri tio ke mi ĉiukaze provos starigi la nepre necesan aktivistan organizaĵon.

Estas tamen evidente ke kun la apogo de la oficiala movado kaj kun la kunlaboro de kelkaj aktivemaj samideanoj, la afero estus multe plifaciligita kaj pli rapide fruktodona.

Tial mi faras novan, varman, kaj espereble konvinkan alvokon al la gvidantoj de la oficiala movado ke ili estu pretaj pristudi la aferon kun mi, kaj al tiuj samideanoj kiuj interesiĝas pri la afero, ke ili kontaktigu kun mi.

Dankon!

FONDAĴO M. Jaumotte - Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

transpreno	134.005 BF	Koran Dankon! (pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de Maertens Gr., Sint-Kruis.)
Anonime 'Verda Stelo'	1.000	
entute	135.005	

... KAJ LA VENKO DE ESPERANTO?

Mi revenas ankoraŭfoje al la sama temo. Ĝi ŝajnas al mi tre grava. Mi volas speciale averti kontraŭ seniluziigo kaj malkuraĝiigo. Ne malmultaj esperantistoj havas jenan opinion: Esperanto kaj ĝia movado ekzistas jam depost tiom da jaroj. Okazis jam tiom da kongresoj; aperis jam tiom da libroj; aperas tiom da revuoj. Ni jam aŭdis pri tiom da simpati-esprimoj kaj helppromesoj fare de "eminentuloj". Do ni devus vidi seriozan progreson kaj antaŭvidi la momenton ke almenaŭ kelkaj ŝtatoj alprenos esperanton en la instruado kaj en kelkaj aliaj siaj institutoj. Tio ne okazas. Aliflanke ni konstatas tre negativan sintenon de la ne-esperantista publiko. Ankaŭ tie la simpati-esprimoj abundas; kaj la "principa" akordiĝo pri la celo de esperanto estas kvazaŭ ĝenerala. Sed. Ili ne lernas esperanton. Ili kontraŭstaras ke iliaj infanoj lernu ĝin "ĉar estas perdo de tempo kiun ili pli bone utiligu por lerni la ĉefajn naciajn lingvojn". Kaj . . . la venko de esperanto ŝoviĝas en ĉiam pli malproksiman estontecon.

Kiuj estas la kaŭzoj de tia ŝtato? Ĉu ni ne sufiĉe "moderne" agas? Ĉu ne sufiĉe "science" kaj "psikologie"? Ĉu mankas iniciatoj? — certe mankas multe da mono por entrepreni grandskalajn "modernajn" aktivajojn. Ĉu ni estas tro mal-laboremaj kaj tro pasivaj?

Ĉio tio estas parte vera; sed nur parte. Ni jam kunvivis bonegajn iniciatojn, bone aranĝitajn kaj organizitajn . . . sed komplete malsukcesintajn; tute sendepende de la iniciatinto.

Por kompreni oni ne povas konsideri la esperanto-movadon aparte, izolite. Kiel jam pli frue dirite, ni devas lokigi nian movadon en multe pli vasta kadro, en tiu de la ĝenerala evoluo de la homaro. Nia movado estas unu inter la multaj kiuj celas progresigi la tutan homaron; materie, morale, kulture. Estas do bone kaj instrue kompari la nian kun tiuj aliaj movadoj.

Kiam mi interparolas kun homoj iom kleraj kaj ili argumentas ke en la daŭro de 80 jaroj esperanto ne sukcesis fariĝi la ĉie aplikata universala lingvo kaj do ne sukcesis konvinki la ŝtatestrojn, tiam mi subite ĵetas antaŭ iliajn piedojn la sekvantajn faktojn. La movado por neniigi la sklavecon ekzistas jam pli longtempe. Ĉu la sklaveco ankoraŭ ekzistas. Jam en 1792 estis proklamita en Francujo la Deklaracio pri la rajtoj de la homo. Oni ankoraŭ ĉie reproklamas ilin. Ĉu do la homoj havas nun tiujn rajtojn? La idealo de politika reĝimo estas la demokratio. Ĉu do ĉie estas demokratio; almenaŭ en la sin demokratataj nomantaj landoj? Mi scias: "omnis comparatio claudicat" (= ĉiu komparo lamas). Sed tamen. Same evidentaj kiel la utilo kaj neceso de universala lingvo estas la malmoraleco de sklaveco, la rajtoj kiujn la homoj devus havi, la porbona rolo de demokratio. Kio do faras ke ĉio tio ankoraŭ ne efektiviĝis?

Ni esperantistoj — same kiel multaj idealistaj aktivuloj en aliaj movadoj — havas la grandan malpravon opinii ke la personoj kiuj gvidas la ŝtatojn kaj ĝiajn institutojn celas justecon, ordon, ĉiesbonon kaj ĉiesrajton, logikon, ĝeneralan bonfarton, kaj citu pli kaj plu. La vero estas ke efektive kelkaj volas tion. Multaj volas *ankaŭ* tion, flanke de aŭ post kelkaj aliaj aferoj; kaj ne malmultaj volas ion tute alian, ion malfacile konfeseblan. Kiam temas pri lingvaj aranĝoj en internaciaj renkontiĝoj, kiel vi volas ke ili estu pretaj allasi lingvon kiun ili ne konas!? Ke la nuna lingva diverseco kostas trezorojn pro traduknecesoj, tio ne gravas al ili; estas ja aliaj kiuj pagas. Mi scias ke oni ne povas ĝeneraliĝi.

Tamen tre malmultaj estas tiuj kiuj ne lasas sin influi de diversspecaj interesoj, antaŭjuĝoj, profitesploroj; aŭ kiuj ne staras sub fortega premo de homoj kaj grupoj.

Ĉu do tiu vido je la aferoj estas pesimista? Se ĝi estas ĝusta, ĉu konkludi ke estas senutila la strebado al disvastigo de esperanto, kaj same senfrukta la strebado al aliaj idealoj? *Ne!* Tute ne; ĉar ĝi akordiĝas kun iu evoluo kiun ni konstatas ĉe la homaro. Estas ja konstateblaj faktoj ke ne-evoluintaj homgrupoj evoluas al nacioj; ke ne-evoluintaj landoj evoluas al kulturlandoj; ke pli kaj pli da homoj iĝas instruitaj, kiuj grupigas sin en fortaj sociaj grupoj. La homaro efektive iras al la stadio de unuiĝo. Finfine la homoj ne povos alie ol trovi raciajn solvojn por la problemoj kiuj ekstaros en tiu evoluo. Por ni speciale, la lingvaj malfacilaĵoj sur internacia tereno devas ankoraŭ multe pli kompliki . . . kaj efektive ĉiam pli kaj pli komplikigis. Do, nia afero estas afero de (longa) daŭro. En alia artikolo ni volas pritrakti kial ne iu nacia lingvo (eĉ ne la angla) povos iĝi tiu internacia lingvo.

Drs. F. Roose



KRONIKO

monatoj ni preparolos kion ni devos fari dum kaj post la kurso. Ni informos niajn legantojn pri pliaj novaĵoj.

ESPERANTISTA SOMERA UNIVERSITATO EN BELGUJO

Tia universitato okazos unuafoje en Lieĝo de la 30-a de julio ĝis la 27-a de aŭgusto, 1972. La rektoro mem de la tiea universitato disponigis la lekciejojn kaj loĝejojn de la moderna kvartalo en Le Sart-Tilman.

La du ĉefaj temoj pritraktotaj estas lingvistiko kaj medicinaj sciencoj. Sed varia kromprogramo estas antaŭvidebla. La organizantoj antaŭvidas ankaŭ por partopreno dum malpli ol 4 semajnoj. La partoprenontoj devos havi almenaŭ abiturientecdiplomon; kaj la aĝo estas fiksita inter 17 kaj 40 jaroj. La kostoj estos proksimume 400 ĝis 500 nederlandaj guldenoj (= tranoktado, tri manĝoj tage, kaj la kursoj). Korespondadreso por interesigantoj: Wim Jansen, Röntgenstraat 32a, Vlaardingen 3170, Nederlando.

LA TELEAC-KURSO PRI ESPERANTO EN LA NEDERLANDA TELEVIDO

Verŝajne niaj legantoj jam aŭdis bruon pri tiu kurso. Unuafoje en la historio de esperanto okazos kurso pri nia lingvo en la televido. La nederlanda Teleac estas preta okazigi ĝin. El la "Komuna Esperanto-Gazeto" de niaj nederlandaj samideanoj ni ĉerpas jenajn informojn. La kurso okazos en la unua duono de 1972. Jam dum pli ol unu jaro kelkaj gesamideanoj kompetentaj prilaboras la kurson. La nombro de la lecionoj estos proks-e 24, po duona horo. Estas necese ke ankaŭ ni konatigu tiun kurson, ĉar multaj ĉe ni povas kapti la nederlandan televidon. En la venontaj

BIBLIOGRAFIO



La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (s-ro Iserentant R.), Kerklaan 61, BRUĜO, Poŝtĉekkonto 152140.

William Auld: "Humoroj" – originala poemaro. 115 paĝoj. Prezo: 2 us.dol. Eldonis, en la serio de la Beletraj Kajeroj, "Stafeto" sub direkto de prof. d-ro Juan Régulo Pérez en La Laguna sur la Kanariaj Insuloj.

En tiu ĉi poemaro manifestas sin ree la sama W. Auld kiun ni jam konas. Foje tiel krude kaj brutale ke en tiuj kazoj ni ne povas paroli pri poemo. Foje tiel sugeste ke antaŭ niaj okuloj aperas ne nur "La Prizono" (p. 55) sed la tuta etoso (!?) de tia instituto. Foje tiel psikologie ĝuste ke la poemo malkovras la realan fonon de la fenomeno ("incitnudiĝo" sur p. 82). Efektive W. Auld ne haltas ĉe la supraĵo de la materia fakto; ĉiam li volas trovi la esencan signifon de (ĉiuj) la fenomenoj. W. Auld vere estas klarvidulo kaj poeto. Sed poeto ne ĉiam esprimanta sin per poemoj; sed pli ĝuste per blasfemoj aŭ raŭkaj elkrioj. Ĉu tamen ne troviĝas psikologia neĝustajo en la komenco de la poemo "Noktomeze" sur p. 62? Ĉu estas la "karno de la homo kiu sopiras Nirvanon"?

Reaperis 'PAŜOJ AL PLENA POSEDO'.

Perfektiga antologia lernolibro de W. Auld. 30 antologiaj literaturaj legaĵoj, vortara difino de 1682 novaj vortoj, 176 ekzercoj.
238 paĝoj 2.— US \$

La unua eldono de la lernolibro de W. Auld por progresantoj renkontis tian sukceson, ke ĝi elĉerpiĝis en malpli ol unu jaro.

La dua reviziita eldono aperis fine de 1970 en Praha, en 5200 ekzempleroj, kiel komuna eldono de Heroldo de Esperanto kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

La lecionoj baziĝas sur analizo de originala aŭ traduka literatura legaĵo verkita aŭ tradukita de fama Esperanto-aŭtoro (de Dinwoodie kaj Privat ĝis Pump, Rossetti, Kalocsay kaj Zamenhof).

La tradukaĵoj reprezentas dek-unu literaturojn, inkluzive de la ĉina, skota kaj aramea. En la fino de la volumo troviĝas listo de 88 konsilitaj libroj kaj adresaro de Esperanto-Asocioj en 63 landoj.

'Heroldo de Esperanto' havas la sol-vendoraĵon por la tuta mondo, escepte de la socialismaj landoj, Rue de la reinette, 13 Pippelingstraat, 1000-Bruselo.

Frapas nin ke eĉ simplaj objektoj pensigas lin pri komparoj kun la hom(ar)lo. Ekz-e "La turbo", p. 63. "Bonan matenon, Majstro" (p. 73) estas majstroverketo laŭ la starpunkto . . . rikana! Ĉu eblas kombini poezion kun komiko? Legu la komencon de "La urbo de mia animo" (p. 30). Ĉu objektoj havas vivon, havas animon? Legu "Post la ŝtormo" (p. 46). "Neebla" sur p. 77 ne estas poemo; kaj mankas la necesa klariga noto ĉe la vorto "blinkenbergoj". Io kio mirigos vin, karaj gelegantoj: enestas facile kompreneblaj poemoj en tiu kolekto (!), ekz-e "Sklavo" (p. 28), "Geedzoj" (p. 56), "Noktomeze" (p. 62). Sed estas ankaŭ aliaj (!), kiel ekz-e partoj de "Simfonieto" (p. 93).

Fine io pri la iom stranga titolo "Humoroj". Ni havas efektive la impreson ke en ne malmultaj kazoj humoreksplodo estas je la bazo de la poemoj. Sed mi certigas vin: valora ĝi estas, tiu poemaro!

Drs. F. Roose

NOTOJ PRI LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO 1971 en Belgio

1. Ministeria cirkulero.

Post mia interveno la Ministro pri Edukado kaj Nederlandlingva Kulturo decidis denove sendigi al ĉiuj lernejoj de la arondisemento Antverpeno cirkuleron en kiu li invitis la instruantojn de moralo kaj de religio pritrakti la temon de Semajno de Internacia Amikeco dum iu leciono de tiu semajno. Estis aldonita teksto kiu povis servi kiel modelo de leciono kaj en kiu plurloke estis atentigita pri Esperanto. La cirkulero kun aldonita teksto estis dissendita la 20-an de januaro 1971. Ĝi atingis la ĉ. 600 lernejojn de la regiono de Antverpeno.

Pri la ĝenerala rezulto mi nur malmulton scias. Ĝenerale tiuj ministeriaj cirkuleroj ne ricevas plenan atenton. Sed mi scias pri kelkaj amikoj, kiuj, avertite pri la fakto, postulis ĉe la direkto de la lernejo tiun cirkuleron, kaj tiel havis la okazon paroli pri la SIA en sia klaso.

2. En Kalmthout (vilaĝo je 24 km de Antverpeno).

a. En almenaŭ tri lernejoj de la vilaĝo en iu klaso la temo de SIA estis pritraktita surbaze de la ministeria cirkulero.

b. En la (rom-katolikaj) mesoj de sabato la 20-a kaj dimanĉo la 21-a la pastro de la paroĥo de Heide-Kalmthout citis en la preĝoj trifoje la Semajnon de Internacia Amikeco. Krome li parolis pri SIA en sia prediko.

c. Krome en la kantita meso de la sabata vespero (je la 18-a horo) la junularĥoro kantis tri kantajojn en Esperanto. La pastro speciale citis ke tio okazas en la kadro de la SIA.

Ĉ. En enkonduko al prelego pri "La homo kiel kultur-kreanta estaĵo" fare de d-ro Wouters, la prezidanto de la kultura centro, s-ro A. Overlaet atentigis pri mondkulturo, pri internacieco, pri internacia amikeco, pri SIA, kaj pri Esperanto (antaŭ ĉ. 80 personoj).

3. En Antverpeno okazis speciala SIA-vespero organizita de la Esperanto-grupo. Ĝi ne havis la saman ĝeneralan kaj malfermitan karakteron kiel pasintjare, sed la etoso estis bonega kaj oni tiel sukcesis daŭrigi la tradicion de SIA-festado (esperable venontjare oni denove povos agi pli larĝe).

W. De Smet

NEKROLOGO

La 25-an de majo mortis, post mallonga malsano kaj apenaŭ sesdekjara, s-ino Suzanne VERBEKE—VANDEN BERGHE, vicprezidantino de "Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo".

Suzanne Vanden Berghe, juna instruistino, aniĝis dum 1931-a al tiu grupo kaj tuj fariĝis aktiva samideanino. Jam en 1932-a ŝi partoprenis en la U.K. de Paris kaj la sekvantan jaron en tiu de Köln.

Krom sia esperantista idealo, ŝi havis belan pentristan talenton kaj plurfoje sukcesplene ekspoziciis, interalie en Antverpeno.

Post ŝia edziniĝo montriĝis plie en ŝi rimarkinda komercista kapablo: ŝi tuj adaptiĝis al la profesio de sia edzo kaj eĉ transformis ĝin en specialigitan firmaon pri artaj kamenoj, al kiu ŝi donis la esperantan nomon "Artkamenon". Tiu nomo ornamis montrofenestron, transportaŭtomobilon, kaj komercajn paperojn de la firmao.

Kiel grupa vicprezidantino, ŝi estis modelo de fideleco, de entuziasma kunlaboro, kaj de kuraĝiga optimismo. Okaze de malhelpo de la kursgvidanto, ŝi kompetente uzis siajn instruistajn konojn por anstataŭi lin.

Eĉ por organizi siajn libertempajn vojaĝojn ŝi uzis la reton de la U.E.A.-delegitoj kaj dank' al ili malkovris malpli konatajn pentrindajn lokojn, kiujn ŝi ame reproduktis per sia arta peniko kaj ankaŭ sur kolordiapozitivaj poste montrataj en la grupaj kunvenoj.

Granda popolamaso, inter kiu multnombraj esperantistoj, ĉeestis la funebran diservon en kiu la grupa Esperantoflago salutis ŝin lastfoje. La celebranto en sia "homilio" aludis ŝian idealismon por Esperanto kiel rimedon por atingi interkonsenton kaj amikecon inter la homoj. Sama aludo aperis en la teksto de la memoraĵbildeto. Multaj ĉeestintoj sekvis la funebran sekvantaron ĝis la tombejo, kie amaso da floroj akompanis ŝin.

La movado kaj speciale la Bruĝa Grupo perdas per ŝi altvaloran kaj neanstataŭigeblan samideaninon.

Ŝi nun ripozu en paco post tiel meritplena vivo.

La bruĝaj samideanoj neniam forgesos ŝin. Al ŝia edzo, s-ro Gregoor VERBEKE, ano de B.G.E., kaj al ŝiaj familianoj, "Sonorilo" kaj pere de ĝi "Belga Esperanto-Federacio" prezentas plej korajn kondolencojn.

K.P.



57-a
UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Portland (Oregon), 29.7. - 5.8.1972

Alta protektanto:
Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon

Konstanta Adreso:
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

Aperis la Oficiala Bulteno

Sespaĝa, grandformata kun multaj fotoj kaj diversaj informoj aperis la Oficiala Bulteno (unua) de la 57-a UK en Portland 1972. Kune kun la aliĝilo ĝi estas senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Antaŭkongreso en Vancouver?

Lige kun la Kanada Esperanto-Kongreso en 1972 la organizantoj konsideras inviti esperantistojn al Vancouver por aranĝo de la antaŭkongreso de la 57-a UK. Vancouver situas 330 mejlojn (530 km) norde de Portland sur la teritorio de Kanado.

Reklamafiŝoj haveblaj

La Oreogna Departemento pri Ŝoseoj disponigis al la LKK 200 belajn bildafiŝojn kiel reklamon pri Portland kaj Oregon. Interesitoj povas peti ekzemplerojn ĉe la LKK, 12946 N.E. Hancock, Portland, Oregon, Usono.

Ĝenerala ekskursiva plano

Por la tuttagaj ekskursoj la LKK elektis turisme plej allogajn celojn, ekz. monton Hood, pacifikan marbordon, akvobaraĵon Bonneville kaj perŝipan veturon sur Columbia-rivero. Krome okazos multaj enurbaj vizitoj kaj promenoj, ekz. al Lloyd-centro.

Vizito al indiana rezervejo

La delegitino de UEA en Gallup, New Mexico, klopodas organizi okaze de la 57-a UK viziton al indiana rezervejo en Arizona. Petu informojn en Esperanto de: Navajo Tribe, Public Relations and Information, Window Rock, Arizona 86515, Usono.

Unuaj karavanoj prepariĝas

Al la pli frue anoncita internacia karavano de UEA (fino Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam 3002, Nederlando) lastatempe aldoniĝis anonco de Brita Esperantista Asocio (140 Holland Park Ave., London W.11, Britujo) pri aviadila grupvojaĝo organizata kunlabore kun vojaĝagentejo Express Travel & Transport Co. Ltd. Ankaŭ Japana Esperanto-Instituto (Hongo 2-2-14, Tokio, Japanujo) ofertas favoreprezan veturon al la kongresurbo de la 57-a UK.


Ili kreos novajn adeptojn

Rezulte de sistemaj klopodoj malfermi kurson de Esperanto ĉe San Francisco State College en somero 1971 oni atendas bonan rezulton. Kiel instruisto funkcios s-ro William Auld, kiel lia asistanto s-ro Duncan Charters.

Statistiko

Je la dato de la 22-a de septembro 1971 aliĝis entute 226 personoj el 26 landoj.

Reĝa Esperantista Brusela Grupo
Hotelo „Excelsior”,
strato de la Progreso 7



Oktobero 1971

04an: Parolata ĵurnalo.
18an: EKI VESPERO, en 'Excelsior':
S-ro René JACOBS komentarios filmon
kun muziko 'Sicilio kaj Etna, en
1971'.

Novembro 1971

08an: Perfektiga Kurso, fare de S-ro David
van der STEMPEL.
17an: merkrede, EKI VESPERO, placo
Roupe: S-ro TOUSSAINT-BURNELLE
parolos pri 'Lanti, fondinto de
SAT'.

Decembro 1971

06an: EKI VESPERO, en 'Excelsior': S-ro
Gian Carlo FIGHIERA prelegos pri
'La meksika revolucio de 1910 (la
tempoj de Francisco Madero kaj
Pancho Villa)', kun lumbildoj.
20an: EKI VESPERO, en 'Excelsior': S-ro
Albert SAMYN afable prizorgos ni-
an komunan ZAMENHOFAN VES-
PERON, kun jena temo: 'Kompari
por krei — Konsideroj pri unu grava
Zamenhofa principo de lingvostu-
dado'.

Ni esperas, karaj Gesamideanoj, ke vi ku-
raĝigos nin ĉeestante REGULE al niaj di-
versaj programoj, tiel ke ni povu estonte
varii kaj disvolvi ilin. Ni atendas VIN!

Via Komitato 1971:

Prezidanto:	JACOBS René
Vic-Prezidanto:	FIGHIERA Gian Carlo
Kasistino:	JACOBS Rose
Sekretariino:	ERNST Elfriede
Help-Sekretariino:	OPSOMER Simone
Propagandistino:	DEWERCHIN Simone
Redaktoro:	CASTEL Hector

TEKSTOJN por la
numero 'novembro-decembro',
tuj ensendu, ni petas!
(plejlaste la 15.10.71)



Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co Pvba.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

P. V. B. A.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875